**N I A V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **APRILO 2008**

## LA LICEO AGADIS

MEL, kiel municipa asocio de publika utileco, petis du subvenciojn al la Madrida Urbodomo: 1.000 eŭrojn por partopreni en la Kongreso de Cuenca kaj 1.244 eŭrojn por aĉeti ŝrankon por la MEL- Biblioteko kiu estas en la HEF-Oficejo. Por ambaŭ projektoj MEL devas elspezi 4.973 eŭrojn.

La informo pri la Bibliografia Ekspozicio okazinta en Hortaleza havas nun, krom la kompleta artikolo de Ana Manero, tri ligilojn al la radio-raportoj kun Toño, al la video de la programeto de TVE2 (enretigita en Youtube far José Rodríguez), kaj al la fotoalbumo de Toño del Barrio pri la ekspozicio:
http://www.esperanto.es/hef/index.php?option=com_content&view=section&layout=blog&id=15&Itemid=156
http://www.esperanto.es/hef/index.php?option=com_content&view=article&id=211:bibliografia-esperanto-ekspozicio-en-madrido&catid=52:Noticia&Itemid=156

La 16-an de marto, gvidata de Juan del Castillo, grupo da madridaj esperantistoj marŝis tra la proksima Natura Parko "La Pedriza". La ekskurso estis sukcesa.

Ankaŭ madridaj esperantistoj partoprenis en la promenado tra la kvartalo San Blas organizita de la senpaga ĵurnalo pri sano kaj medicino "Bien". Ĝi okazis la 30-an de marto.

## EN HISPANIO

Pere de http://esperantomuziko.blogspot.com/ ni ekscias pri madrida muzik-bando, kiu havas unu kanton en esperanto. Ili nomiĝas "Tupelopone"
http://profile.myspace.com/index.cfm?fuseaction=user.viewprofile&friendid=239499446
Estas kelkaj frazoj en esperanto en la prezento. Krome, ili asertas ke "tupelopone" estas esperanta vorto (!?): *La palabra TUPELOPONE es la forma adverbial del verbo "tupeloponi" (en la lengua internacional esperanto), cuya principal acepción, aunque no la única, es "flipar con el pelo de alguien". Si bien es cierto que también se puede flipar con la ausencia de pelo, aunque en esos casos se suele utilizar, preferentemente, el verbo "senharaponi".*

## ESPERANTA MONDO

Radio Polonia: La ĉiutagajn E-elsendojn vi povas aŭskulti rekte per la paĝaro: http://www.polskieradio.pl/eo/ kaj http://www.polskieradio.pl/podcast/39/podcast.xml

La 20an de februaro 2008 aperis la dua podkasto de "La Ondo de Esperanto". Post superrigardo pri la reagoj al la unua radioprogramo de "La Ondo", oni povas aŭskulti Esperanto-novaĵojn el pluraj landoj de la mondo, prezenton de la nova disko "Invito por vojaĝo" de Jacques Yvart kaj, kiel la ĉefan programeron, humuran novelon "Historio de komerca entrepreno" de Anton Ĉehov. La 38-minutan programon voĉe prezentas Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov. La podkastoj de "La Ondo" estas aŭskulteblaj ĉe http://la-ondo.rpod.ru/ [premu la sonvinjeton por aŭskulti]

La Eŭropa Komisiono aprobis kulturfonduson por traduki kolekton da infanlibroj, en kiu esperanto rolas kiel ponto-lingvo. La projekton ellaboris Zlatko Tišljar por Kroata Esperanto-Ligo, kaj partoprenas Edistudio (Pisa-Italio), Inter-kulturo (Maribor-Slovenio) kaj barata eldonasocio Samatat Sikŝa. EU financos la projekton per 64.000 eŭroj.

Dank'al la atento de UEA al la agado de UNESKO por diskonigi la Internacian Jaron de Lingvoj 2008, Unesko afiŝis en sia retejo e-tradukon de la deklaro de sia Ĝenerala Direktoro, Koichiro Matsuura, pri tiu evento.

La Papo Benedikto la 16a denove salutis en Esperanto (inter aliaj 62 lingvoj) okaze de la Pasko de la Resurekto.

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

03-06 julio: 67-a Hispana Kongreso de Esperanto. Cuenca . alejandro.pareja@gmail.com
19-26 julio: 93-a Universala Kongreso de Esperanto. Roterdamo (Nederlando)
26 julio-2 aŭgusto: Internacia Junulara Kongreso (TEJO) Szombathely (Hungario)

## HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La Sekretariejo de HEF funkcias en Rodríguez San Pedro 13 lunde vespere (17,00-20,30h), dum aliaj tagoj vi povas faksi aŭ telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es

**Kupono de ONCE pri Zamenhof aperos la sabaton 17-an de majo 2008**.

HEF ne trovis sufiĉe da volontuloj por deĵori dum la "Feria del Libro de Madrid", do… ne petis budon por partopreni.

**Hispana Esperanto-Kongreso 2008.** Cuenca 3a ĝis la 6a de julio.
Bonegan oferton por loĝado!!
http://www.esperanto.es/hef/index.php?option=com_content&view=article&id=207&Itemid=238

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

La konversacia-rondoj kiujn organizas Madrida Esperanto-Liceo okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3-7º, Tel. 91 446 80 79.

La unuan lundon de ĉiu monato, **ekde la 7-an de aprilo, je la 19,00h**, **la konversacia rondo estos gvidata de Juan del Castillo:** *"Tial ke la konversaciaj rondoj de MEL ŝajne ne vigle funkcias nuntempe, mi planas revivigi ilin kun via helpo, madridaj esperantistoj. Ĉiun monaton oni povus trakti unu difinitan temon (ja ne sufiĉas scii paroli: necesas havi temon priparolindan, ĉu ne?). Kaj se temo estas polemika des pli bone. Prefere se ĉiun fojon la tem-proponanto ŝanĝiĝas, sed tio ne estas deviga. Kvankam ne temas pri prelegoj, proponanto devus iomete prepari la aferon. Tiel ĉio funkcios glate. Nu, parolemuloj, ekkoniĝu!*

KURSOJ:

**Vallecas**. Pedro Hernández organizas bazan kurson, sabate je la 17,00-a horo kaj je la 18,30-a meza nivelo. Tel. 91 507 90 84/85 kaj 667 721 951

PRELEGOJ:

17-an aprilo, jaŭdo je la 18,30, Casa de Guadalajara, Plaza Santa Ana 15. "El esperanto en el año internacional de las lenguas", prelego de Toño del Barrio.

**La kotizo de MEL por la jaro 2008 estas 12,00 eŭroj**

La membroj kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon, povas pagi 12 eŭrojn rekte la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro 13-3º-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid, Banco Sabadell/Atlántico konto 0081/7110/98/0001266730

---

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid